

La NASKa Fasko


Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

mardon, la 2-an de Julio, 2013 • numero sep

Kio okazos hodiaŭ?

★ 8:30 atm – tagmezo:
Lecionoj

Flowe, unua etaĝo



★ tagmezo: grupfoto / group photo
Ŝtuparo apud Belk Dining Hall

★ 2:00 – 3:00 ptm:
Rikardo prezentos pri sia urbeto
Cascorro

Flowe, unua etaĝo

Cascorro estas nomo de la loĝloko de Rikardo; la urbeto situas en la provinco Kamaguejo, en Kubo.

★ 3:00 – 4? ptm:
Ĵenja parolos kun tiuj, kiuj
interesiĝas pri provfilmado

Flowe, unua etaĝo

★ 7:00 – 7:15 ptm:
Nazaré kaj Vicente kantos

Flowe, unua etaĝo

★ 7:15 – 8:00 ptm:
Prezento pri Ajkido

Flowe, unua etaĝo

Venu tuj post la kantado kaj eksciuj pri tiu ĉi moderna japana luktarto kaj ties ligoj kun Esperanto kaj la japana religio Oomoto.

La NASKa Fasko

Redaktejo: Finley 112
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro. Trovu ĝin matene sub via pordo aŭ en la komuna ĉambro ĉe la unua etaĝo de nia loĝejo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 112, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

Vojaĝraporto

de Venero MUELLER

Dum la sabata ekskurso en Raleigh mi vizitis tri konstruaĵojn: la muzeon pri natursciencoj (*vidu dekstre*), la muzeon pri historio, kaj la ŝtatomon.

La muzeo pri naturscienco estas tre impona konstruaĵo. Ĝi havas kvar grandajn etaĝojn kaj altvalorajn ekspoziciojn de dinosaŭroj kaj vivaĵoj kaj mineraloj. Ankaŭ la muzeo de historio estas tre impona moderna konstruaĵo. Oni facile povas eniri tiujn konstruaĵojn.

Sed la Ŝtatomomo de Norda Karolino estas relative malgranda kaj neimpona. Tamen enirante oni devas demeti ĉiun metalajon ĉe la metaldetektilo.



Intense atentas Ben, Bala, Lena kaj Minjo dum go-ludo

Ŝanĝo

de Maria Nazaré de C. Laroca

Dum jarmiloj
Mi sonĝis arbe;
Mi lernis radikojn
De malavareco.

Kaj skuis min
Besteca instinkt'
Por ke mi fariĝu hom'
Iom post iom.

Sed tute mi emas
Al birdvivo:
De migrantaj birdoj.

Mi volas krei neston
El poezi' flugilhava
Kaj mia univers'
Enhaviĝu nur
Unuverse ĉiam
Moviĝante.

Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

de Maria Nazaré de C. Laroca

Travivi
Esperantujon
Estas ĝui
Neimageblan
Amaferon.

Pensi tutmonde

de Mar CARDENAS

Laŭ Alberta CASEY, fama kantistino en Esperantujo kiu loĝas en Sandiego, homoj kiuj lernas aŭ disvastigas Esperanton pensas je malsama nivelo ol la plejmulto de la homaro. Ili pensas tutmonde. Ili volas komunikiĝi kun homoj el aliaj landoj kaj pligrandigi siajn proprajn horizontojn.

Kiel ŝi interesiĝis pri ĉi tio? Nu, kiam ŝia filo estis juna ŝi diris, "Iam mi iros al la Unuiĝinta Naciario kaj diros al ili, ke ili devas havi komunan lingvon, do ili forigu tiujn tradukojn kaj miskomprenojn!"

En la jaro 1971 kiam ŝi vizitis Londonon, hazarde ŝi malkovris ke la lokaj esperantistoj pretis havi sian landan kongreson ĉe la loka universitato. Tio estis la komenco por ŝi. Kiam ŝi reiris hejmen, ŝi aliĝis al Esperanta kurso. Tuj poste ŝi komencis pensi pri la ebleco kanti en Esperanto kaj vendi kasedojn internacie. Ŝi kantis en kelkaj korusoj antaŭe.

Ŝia patrino havis belegan voĉon kaj ŝi seniluziĝis kiam ŝiaj tri filinoj ŝajne ne taksis kantadon serioze. Alberta ankaŭ ludis la violonon. Kiam ŝia patrino mortis, Alberta sentis sin kulpa ĉar ŝi neniam realigis sian deziron, ke almenaŭ unu el la tri filinoj iĝu kantisto.

Produkti la kanton estis laciga laboro. Ŝia prononcmankado devis esti akceptebla en aliaj landoj krom Usono. Ĉiuj el la tradukoj estis faritaj de altnivelaj esperantistoj. Ŝi devis skribi al verkistoj por peti permeson uzi iliajn kantojn. Estis 30 kantoj entute. Ŝi devis pagi por la uzo de ĉiu kanto.



Dumtempe ŝi vojaĝis al Eŭropo portante diskojn, kantante antaŭ kelkaj Esperantaj grupoj kaj ĉe internaciaj kongresoj dum tiu somero en ekscitoplenaj lokoj en Budapeŝto.

La diskoj estis sukcesaj. Homoj ludis ŝiajn kantojn kaj radiostacioj ankoraŭ ludas ilin en Pollando, Francujo, Anglujo, la Vatikano, Kubo, Ĉinujo kaj eble ie alie.

Dum multaj jaroj ŝi apogis la usonan Katolikan Esperantan Societon kaj ankaŭ la internacian. En la jaro 1987, la urbo Sandiego naskis la organizon Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, danke al la laboro de Charlotte KOHRS. Povas esti ke la vera sukceso de Esperanto venos al la mondo pere de la infanoj.

Por pli da informo, iru al Facebook kaj serĉu la nomon "SrinoCasey".

Demandu al la Fasko: kiel traduki la vorton *rakish*?



Demandu de

Lusi: Mia edzo havas ĉapelon, kiu donas al li ĉarme "rakish" aspekton. Kiel koncize traduki tiun vorton en Esperanton?

Respondo: *Rakish* estas anglalingva adjektivo derivita de la substantivo *rake* – kies de-

veno, efektive, ne estas tute klara.

Ĉiuokaze, *rake* signifas diboĉeman viron, verŝajne senskrupulan, kiu estas ankaŭ alloga kaj eleganta, kaj tial kapablas facile delogi virinojn.

Simila ideo troviĝas en la franca vorto *roué*, la hispana legendo de *Don Juan*, la rolulo *Lothario* el *Don Quixote*, kaj la anglalingvaj esprimoj *ladykiller* kaj *ladiesman*.

Do, *rakish* priskribas ion (aŭ iun) vire delogan, nerezisteble elegantan aŭ dezirekscitan, eble malĉastan... kaj eĉ iomete danĝeran.

En Esperanto ekzistas simila vorto *pimpa*, kiu laŭ PIV signifas "gaje loga, dezirekscite eleganta". Do, se vi volas emfazi nur ĝian allogan aspekton, eble vi uzu *pimpa ĉapelo*.

Alia eblo estas adjektivigo de la nomo *Donjuano* (ankaŭ *Donjuano*), la legenda kaj vira viro kiu senskrupule delogis tiel multajn virinojn. Oni povus paroli pri *donjuanan ĉapelon*, ekzemple, aŭ montri eĉ "donjuanan aspekton" – ĝuste kiel faras iu viro en la bildo maldekstre. (Kaj kiu estas tiu viro? Kvankam oni ofte konfuzas lin kun via kara redaktoro, efektive temas pri la usona aktoro Johnny DEPP.)